Internacia Librotrezoro

Kajero IIa/IVa

# SABLEROJ

De

Marie Hankel

Eldonejo ▪ Verlag
Deutsche Esperanto-Buchhandlung
Germana Esperanto-Librejo
Leipzig

# Internacia Librotrezoro

Kolekto de elektitaj kaj aparte rekomendindaj romanoj, noveloj, humoraĵoj, poemoj, teatraĵoj k. t. p.

**Originaloj kaj Tradukoj de ĉiunaciaj aŭtoroj.**

Ĉiu kajero kostas Sm. 0.10.

1. Rozo sovaĝa aŭ pentita kulpo. Novelo. Versaĵoj. de **P. Kress.**

2/4. Sableroj. Eldono de ĉiuj verkoj de S-ino Prof. **Marie Hankel.**
Eldono bele bindita . . . . . . Sm. 0.50.

5/6. La imaga malsanulo. Komedio de Molière, esperantigis S-ro Rektoro **W. Velten**, Lingva komitatano.

La kolekto estas daŭrigota.

## Rekomendindaj Muzikaĵoj.

**Ménil, F. de.** Esperantujo. (Poezio de M. Hankel.) Eldono por kanto kaj fortepiano. Sm. 0.50.
— Verda Stelo. (Poezio de M. Hankel.) Eldono por kanto kaj fortepiano. . Sm. 0.50.
— Espero, por kanto kaj fortepiano. Sm. 0.25.
— Espero, eldono por fortepiano. Sm. 0.25.
Tekstfolioj po 10 ekz. 0.10; po 50 ekz. 0.40; po 100 ekz. Sm. 0.50

**Saavedra, D.** Valso esperantista, por fortepiano. Sm. 0.50.

**Simon, E.** Patrino kaj infano, por kanto kaj fortepiano. Sm. 0.25.

**Strzelecki, H.** Sopiro, por fortepiano. Sm. 0.50.

**Deutsche Esperanto-Buchhandlung, Leipzig**

Internacia Librotrezoro

Kajero IIa/IVa Sm. 0.30

# SABLEROJ

De

Marie Hankel

Eldonejo ▫ Verlag
Deutsche Esperanto-Buchhandlung
Germana Esperanto-Librejo
Leipzig
1911

11392

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 2621
FILIA Nr 14
w Białymstoku
82-3
821.922-1=922
821.922-3=922

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

# Moto.

Kiu povas alporti brikojn, tiu alportu ilin.
Jen mia kotizaĵo: Sablero post sablero nur!
Mi esperas, ke ankaŭ la

**Sableroj**

estos utilaj kaj helpaj por la eterna
konstruaĵo de nia homa kulturo.

Dresden 1911.

Marie Hankel.



Fot. Hugo Erfurth, Dresden.

*Marie Hankel.*

Vidvino de la universitata profesoro
D-ro Hermann Hankel.

## Unua Parto.

Poezio.

En amikeco!

Kristnasko 1921

Frida Hochsteiner

Stutgarto.

## La verda stelo.*)

La bela verda stelo
Kviete brilas jen,
Ĝi estas alta celo,
Allogas nin...kien?

Steleto, kara mia,
Kion do volas vi?
La brila lumo via,
Kion alportas ĝi?

La stelo, bela, klara,
Mallaŭte diras ĝi:
Mi petas, mia kara,
La fratojn amu vi! (1906)

*) Eldono por kanto kaj fortepiano de Barono F. de Ménil M. 1.— (Sm. —.50).

Eldono por horo de Clemens Braŭn. Partituro M. —.40 (Sm. —.20); ĉiu voĉparto M. —.10 (Sm. —.05).

## Post la unua kongreso.

Kian mirajôn mi vidis! mi aŭdis la vortojn enigmajn:
„Tuj, alveninte Bulonjon, ni povis paroli, kompreni,
Aŭdi la vortojn amatajn, fluantajn el buŝoj de l'fratoj,
Vere ja ŝajnis al ni, pentekosta miraklo revenis!“

Dum la rakonto la via, mi vidis flameton lumantan
Sur via kapo, mi vidis okulojn kaj trajtojn ekbrili!
Nun mi denove esperas, mi kredas miraklojn kaj signojn.

## Esperantujo.*)

Mi ion deziras, mi havas demandon,
Mi serĉas ian tre belan landon!
Landon kun por mi florantaj floroj,
Kie varmege batas la koroj.

Ho lando belega, ĉu vi ekzistas?
Sur nia tero, kie vi troviĝas?
Lando, varmege deziregata,
Kie vi estas, ho mia amata?

Al via demando mi scias respondon:
Amikaj koroj plenigas la mondon,
Lando floranta jam estas trovata,
ESPERANTUJO ĝi estas nomata.

(1907)

*) Eldono por kanto kaj fortepiano de Barono F. de Ménil M. 1.— (Sm. 0.50).

## En songô.

En songô mi bone parolas
La lingvon sen ia eraro,
Dirante mi, kion deziras,
Kaj ĉiam sen help'de vortaro.

Facile la vortoj alvenas,
La frazojn mi formas fluante,
Neniam pri „sia" mi penas,
Mi ĉiam komprenas „aŭdante".

Malbona la akuzativo
En songô neniel ekzistas,
Ho, bela en songô la vivo
El pura korĝojo konsistas.

En songô . . . ho ne, mi ne dormas:
Mi vidas la helan matenon,
Kaj tamen la vortojn mi trovas, —
Nun fine, mi rompis katenon!

Mi nun efektive parolas,
Kaj jen babiladas fluege,
Dirante mi, kion deziras,
Mi estras la lingvon ĝojege! (1907)

# Nia lingvo.

Nia nobla reĝidino,
Lingvo bela, sankta, klara,
De l' feinoj la filino,
Ho, ŝi estas al ni kara! —

Nia estas la infano,
Ŝian nomon donis ni!
For de ŝi la via mano,
La koleron timu vi!

Entuziasmon vi ne konas,
Ĝian forton kaj valoron,
Ni eterne ne fordonas
Nian amon kaj trezoron.

(17 an de Novembro 1907)

## Nia Esperanto vivas.

Nia Esperanto vivas,
Floras ĉie sur la tero,
Ĉie nia lingvo servas
Al la bono, belo, vero.

Nia Esperanto vivas,
Tion montru la kongreso,
Flue, lerte ni parolas:
Nia estas la progreso!

Ni kongresas ĉiujare
Por festadi gajan feston,
Tial venis ni grandare,
Sopirante la ĉeeston.

Post laboro kaj penado
Nun postulas ni ripozon,
Post dornega laborado
Ni deziras nun la rozon! (1908)

# Prologo.

Salutas kore nia aro
Je tiu ĉi kunveno festa,
Malgranda estas nia faro,
Kaj la aranĝo tre modesta.

La prezentadon volu aŭdi
Kun indulgema pacienco,
Kaj tro severe ne mallaŭdi,
Se mankas arto kaj scienco.

Mallonga estas la programo,
Sen alta arto nia kanto,
Sed granda estas nia amo
Por nia bela Esperanto.

Nia ŝipo sur la maro —
Ĝoju Esperantistaro!
Al haveno la celado:
Bone iras la naĝado!

Bonan akcepton al ĉiu venanto!
Helpu, ni petas vin, al Esperanto!
Ni ne postulas arĝenton kaj oron,
Donu laboron al ni, kaj la koron.

(Januaro 1907)

## Matenfruo.

Matenfruo, pura, freŝa kaj belega,
Vi fortigas kaj vivigas min!
Venu tago suna aŭ ventega —
Mi kuraĝe nun suferos ĝin.

## La bukloj de Simson.

En kio kuŝas nia granda forto,
Por save kontraŭstari al la sorto
De la pereo, al ni minacata?

La forto nia estas unueco,
Al nia fundamento fideleco,
Jen la mistera povo nekonata!

(Junio 1908)

## La simbolo de l'amo.

Rozujo sovaĝa, simbolo de l'amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas:
„Silentu, silentu, mi dormon bezonas,
„Min nutras denove patrino la tero,
„Pacience atendas mi ĝis la somero."

Dormantan rozujon printempo vekigis,
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,
Girlandan balancan kaj brilekoloran!

„Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian,
„Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
„Pro amo mi miajn floretojn defendos,
„Pro amo mi miajn pikilojn forsendos."

Al vento ĝi florofoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis:
Rozujo, simbolo de l'amo vi restas,
Pacienca, alloga, kuraĝa vi estas.

(1909)

## En doloro.

Mi ludas la harpon
La karan al mi,
Kaj melodiojn mi vekas el ĝi!
Elvenas la tonoj,
Elflugas la sonoj,
Esprimas doloron . . .
Pacigas la koron! (1908)

## Konstruestro Zamenhof.

Ĉu vi ekvidis la konstruaĵon,
Novan, majestan kaj ĉiopotencan,
Elpensitan de saĝa regnestro?
Reĝo li estas en Esperantujo!
La fundamento, de li firmigita,
Neniel skueble ĝi kuŝas en tero.

Nun ni mezuris, pripensis senĉese,
Kaj ni masonis belegan kastelon
Multekoloran, per nia ŝtonaro.
Alten kreskadas fiere la templo,
Kie Saĝeco, Beleco ekloĝas.
Ĝian tegmenton Singardo konstruis,
Sed la turojn, la pintojn, balkonojn,
La kornicojn, beletajn, graciajn,
Ilin konstruis la Poezio,
Aldonante facilan ornamon.

Vidu pordegojn jen, malfermiĝante:
Venu, eniru, la Majstron laŭdante!
(1908)

## La busto.

Artisto, per mano kaj ilo,
Jen estas kreinta artaĵon,
El simpla, senviva argilo
Li sciis elveki belaĵon.



KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego
Nr ............
FILIA Nr 14
w Białymstoku

La bildo sen vortoj parolas,
Aŭdigas kaŝitan misteron,
Kaj ion eldiri ĝi volas,
Esprimi al ni ian veron.

Aŭdeble, sen ia eksono,
Ĝi montras la veron trovitan:
Eternan animon de l'bono,
Sekrete en ĝi enblovitan. (1909)

## Ĝuego.

Bruletu, ardetu,
Ĉarmega kreskaĵo!
Montetoj, arbaroj,
Herbejoj, kamparoj,
Blua fluaĵo
Aperas, alvenas
Kaj tuj malaperas!
Dolĉaj memoroj,
Iamaj doloroj
Alflugas, forflugas —
Bruletu, ardetu,
Ĉarmega kreskaĵo!

## Vana espero.

Somero alvenis,
Per floroj nin benis,
Varmega la tero
Kaj viva l'espero!

Nun ridas la suno
Al ni de l'aŭtuno — —
Sed ĉiel nur ploroj,
Malgajaj la koroj!

Ho, kial vi plendas?
Ni fruktojn atendas,
Sed nuda la tero — —
Kaj vana l'espero!

*Tamen!*

Laboro senlaca,
Persista kaj paca,
Kvazaŭ nur prove
Penadas denove

Kun timo kaj tremo,
Per diligentemo.
Proksiman la jaron
Ni trovos fruktaron!

## Al Sully-Prudhomme, adiaŭ el Germanujo.

Vi iris for el nia tero,
Eterne nun silentos vi,
La belajn vortojn de la vero
De nun neniam aŭdos ni.

Mi ofte sentis la deziron
Saluti vin el mia kor',
Esprimi skribe la admiron — — —
Ne eble nun, vi iris for.

Animo justa, nobla koro,
Vi dormas, kaj ne aŭdas min,
Konsolo nur en la doloro:
La verkoj viaj benis nin. (1907)

## La sonĝo de l'tero.

Kion sonĝis nia tero
Tramigrante la stelarojn?
Kia estis la mistero
Ĉin pelanta multmiljarojn?

Ĉi volis kreskigi floraron,
Deziris naskigi homaron.

Multajn florojn tero portis,
Ili velkis forblovitaj,
Multaj homoj venis, mortis,
Kun postsignoj netrovitaj.

Nur kiam heroo naskiĝas
La sonĝo de l'tero veriĝas.

(1909)

## Adiaŭa vorto de la reĝino.

Nun la bela jaro pasis,
Ĉarma revo, kora ĝojo!
Ĉi postsignojn gajajn lasis,
Floroj kreskis sur la vojo!

El la vasta regiono
Multaj laŭdoj kaj gratuloj
Venis al la reĝa trono
De sindonaj la subuloj.

Ĉu, sonĝante mian revon,
Ĉiam bone mi regadis?
Kaj plenumis mian devon,
Dum aliaj bataladis?

Por batalo kaj laboro
Premas kore mi la manojn,
Dankon sentas mia koro:
Mi amegas la regnanojn!

Ĝoje sonu mia kanto.
Entuziasme, kun adoro,
Por la kara Esperanto,
Nia beno kaj trezoro.

Mi reĝino ne plu estos — —
Pasis jam la bela jaro!
Membro mi humile restos
De la diligenta aro. — (1910)

## Mia hejmo.

Mia hejmo estas: „Tero“,
La patrujo mia: „Mondo!“
Min ĝojigas nur la vero
Pri la bela vasta rondo.

La patrino estas suno,
La varmiga taga stelo!
La steletoj kun la luno:
La gefratoj sur la ĉielo!

Sur la tero la vivaĵoj,
Unu granda parencaro!
Ŝtonoj, bestoj kaj kreskaĵoj,
Sur la lando, en la maro!

Ni nin nutras kaj ornamas,
De l'naskiĝo ĝis la morto,
Ni suferas kaj ni amas — —
Nin kunigas nia sorto. (1910)

## Sankta nokto.

Sankta nokto, luma, hela,
Ĉiujare vi revenas,
Vi la vivon igas bela,
Vi la homojn ame benas.

Vi alportas belajn horojn
Al la familia rondo,
Vi ĝojigas homajn korojn
Ĉie en la vasta mondo.

Vi parolas pri la amo,
Pri kuraĝo kaj espero,
Ekbruliĝas nova flamo,
Nova lumo nun sur tero.

Sub la bela, verda stelo,
Sankta nokto, ni vin festas!
Nia ideala celo
Paco, amo, ĝojo estas! (1910)

## Patrino kun infano.

Tra landoj mi migris, tre multon mi vidis,
Tre strangajn kutimojn kaj morojn aliajn.
Mi miris, kompatis, aprobis aŭ ridis,
Sed ĉiam respektis kutimojn la piajn.

Diversaj la bildoj de l'Dioj ja estis,
Teruraj kaj mildaj, majestaj kaj belaj.
Kaj ĉie piuloj preĝadis kaj festis,
Kun koroj sindonaj, al kredo fidelaj.

La homoj al bildoj prezentis adoron,
Serĉante konsolon, petante la sanon
Plej multe al mi dolĉimpresis la koron
La bild' de patrino, sur brako l'infanon!

(1909)

## Sankta Kristofero.

Bone konata en kristanaj landoj estas la legendo pri Sankta Kristofero. Iafoje oni vidas sur muro pentraĵon: forta viro trapaŝas, sin apogante sur bastono, riveregon, rapide fluantan. Sur la ŝultro li portas delikatan infanon, kiu tenas en unu el la etaj manoj terglobon. La alian manon la knabo kun gesto de benado suprenlevas, la terglobon ornamas kruco, la buklan kapon ĉirkaŭas gloriolo. La knabo estas Jesuo, li, la estro de la tero.

Kial la mieno de la viro, kiu portas la knabon, estas tiel serioza, la frunto tiel sulka?

La legendo al ni rakontas, ke li estis serĉanta estron tre fortan kaj potencan, nur al la plej forta li volas servuti. Tio estas lia ambicio, lia fiereco. Post longa migrado kaj vanaj provoj la viro sin trovis foje apud ondiĝanta riverego. Antaŭ ol li komencas travadi ĝin, li

aŭdas voĉeton infanan: „Portu min, ho portu min trans la riveron!“

Serveme kaj kompleze la giganto levas la petantan infanon sur la ŝultron, ĝi estis malmultepeza ŝarĝo. Sed kio okazas! Post kelkaj paŝoj la knabeto fariĝas pli peza, ĉiam pli la infano premas kaj penadigas la gigantan viron, tiu kurbiĝas sub la peza ŝarĝo, ne komprenante la kialon.

Ni ĝin divenas: la knabo ja estas la Savinto de la mondo, alegorie li portas la mondon en la mano, pro tio li estas tiel peza!

Ne nur bildoj rakontas la legendon, ankaŭ poetoj ĝin al ni ripetas, bone konata estas la versa rakonto pri tiu ĉi epizodo, verkita de Gerok.

Ni vidas, ke la ideoj de la homaro ĉiam denove sin prezentas en simila formo, ankaŭ ni Esperantistoj prenis sur nin taskon por la bono kaj la beno de la homaro.

Facila estis la komenco de la laboro, pli kaj pli ĝi kreskas, ĝi nin devigas labori senĉese, eĉ super niaj fortoj!

Ni laboru kaj esperu!

„Infano vi, jen sur la ŝultro,
Pro kio vi tiel min premas?
Facile mi supren vin levis,
Kaj nun mi suferas kaj ĝemas.

Volonte mi al vi servadis,
Helpema al eta infano,
Nepeza al mi vi ja ŝajnis,
Ludilo en mia la mano!“

„Servisto fidela, ne plendu,
Se mi vin premadas nun foje;
Se multe mi kaŭzas suferon
Ne perdu kuraĝon survoje.

Mi devas ja kreski, kreskadi,
Ĉar mi al la mond' apartenas,
Mi estas la lingvo komuna,
Al homoj nun ĉien mi venas.

Mi estas Espero de l'mondo,
Kaj tiun Esperon vi portas,
Restadu fidela servisto,
Daŭrigu, vi certe ne mortas.

Grandega la via penado,
Senfina la via laboro,
Sed kreskas ja ankaŭ la forto.
La sindonemeco de l'koro.

Vi devas trairi la mondon
Kun via ligil' de l'Espero,
Ĝis kiam ĝi estos portita
En ĉiun ajn lokon de l'tero." (1910)

# Dua Parto

## Prozo.

## Ĉu la homo amas la naturon?

Ne tro rapide jese respondu la demandon, kara leganto! Ne ĉiuj homoj amas la naturon, multaj estas indiferentaj, aliaj ĝin timas. En iama tempo la timo neniel permesis ian senton de amo aŭ de admiro. Eĉ la kuraĝuloj timis la naturon, ili ne hontis tion konfesi.

Kiel terura ekzemple por ili estis la maro! Ĝi detruis la bordojn, forrabis fruktajn distriktojn, ĝi minacis la ŝipojn per mil danĝeroj, ĝia profundeco kaŝis nekonatajn, abomenajn monstrojn. La homoj ankaŭ timis la riverojn, kvankam sur la bordoj ili loĝis, ĉar printempe ili fariĝis torentegoj, ili superakvigis herbejojn kaj kampojn, forŝiris pontojn, detruis domojn. La lagojn oni timis, ĉar ilia trankvileco estis trompa, ruzege ili dronigis boatojn, ili forsendis malvarmajn ventojn, kiuj minacis la plantaĵojn kaj fruktojn. Oni sin ŝirmis per altaj muroj, la domoj montris la dorson al la lago, kiel ajn bela ĝi estis! La pluvegon, la hajlon oni timis, sen armilo oni sin sentis antaŭ la malamikoj de la rikolto. Kiel sin protekti kontraŭ la fortoj de la naturo? La timigita homaro ĉion

provis, ĝi fordonis oferaĵojn ĉiuspecajn, eĉ la vivo de amataj homoj ne ŝajnis tro altvalora ofero, por trankviligi la ĉiopovan naturon. Ho, kia malĝoja, abomena eraro!

Terurega estis la fulmotondro! Kia timo ekkaptis la homojn, kiam ili rimarkis la minacantajn nubojn, kiuj certe eksplodos kaj eble morton aŭ bruladon forsendos! Kia terura forto estis la fajro, tiel necesa kaj tamen tiel danĝera! La montoj, la montaroj estis timindaj! Oni ne riskis alproksimiĝon al ili, la loĝantoj de la valoj konis iliajn danĝerojn. La nomoj, al ili donitaj esprimis klare la opiniojn de la bedaŭrindaj timemuloj.

Ankaŭ la arbarojn oni timis. Ne nur sovaĝaj bestoj kaj rabistoj tie minacis la vivon, kontraŭ ili oni ja kuraĝe povis batali, multe pli danĝeraj estis la demonoj loĝantaj en la densaĵo. Preskaŭ ĉiu arbaro estis ensorĉita, ne nur la demonoj el la antikva tempo, la diablo mem spionis en la kavoj kaj intermontaĵoj. La diablo! Kiam li eniris la naturon, la lasta brilo de ĝojo aŭ kompreno eliĝis el la nin ĉirkaŭanta mondo! La tero fariĝis preskaŭ infero. Eĉ multaj kreskaĵoj estis diablaj kaj ensorĉitaj, la superstiĉo sternis densan, malluman ombron sur la homan animon. La nokto, la dolĉa, trankviliga amikino de l'homo, kiel malĝoja ĝi fariĝis! Je noktmezo la fantomoj

forlasis la ĉerkojn, la tombejoj estis tiel teruraj, ke jam al ili la pensado glaciigis la sangon de la homoj. La luno kaŭzis timon senliman, ĝi frenezigis la kompatindajn vivulojn. Kometoj anoncis peston kaj militon, kaj kiel danĝeraj fariĝis la planedoj por homo per ia malfavora konstelacio!

Kiu nin liberigis el tiu ĉi honta, malinda stato? Kiu estis la savinto, montrante al ni la naturon je alia, pli ĝoja formo? Ne unu persono havas pri tio la meriton, la homoj kune trovis la ĝustan vojon per siaj poetoj kaj scienculoj.

La poetoj ekkomencis. Iliaj okuloj ne tiel atente observadis kaj rigardis la danĝerojn, kontraŭe, ili kovris per rozkolora vualo la teruraĵojn, ili riskis ŝercan rakonton, ili revivigis la pli gajajn opiniojn de la antikva tempo, ili parolis pri feinoj kaj nimfoj, pri driadoj, pri Eĥo kaj Iriso. La suno estis nomita „nia patrino“, la luno „amiko de la medito“, la steloj „niaj gefratoj“.

Sed la poetoj restus senefikaj sen la helpo de la scienculoj kaj elpensintoj. Pacience, per sennombraj eksperimentoj ili eltrovis la naturleĝojn. La kono de la leĝoj ebligis al ili la venkon de la sfinkso: Naturo! Depost la kaptado de la fulmo la timo iom post iom plimalgrandiĝis. Kuraĝe la homo ekprenis unu forton de la naturo post la alia, inteligente li nun uzas ilin

por la beno de l'homaro. La teleskopo kaj la mikroskopo kune kun la fotografilo montras al ni la plej intimajn sekretojn de la naturo. Ni vidas devenon kaj morton, eternan ŝanĝadon. Misteroj estas kompreneblaj, nekonataj veroj eltroveblaj, ĉio, kion oni vidas kaj trovas estas simpla, senmirakla kontinueco, nenie ia kaŝita, demona malamiko, sendante friponajn sagojn, estas trovebla, kial do timi? La timo malaperis el la mondo, kiel nebuloj malaperas antaŭ la suno. La lumo de la scienco forigis la timon, nun la poetoj povas senlime kanti pri belaĵoj de la mondo. Ankoraŭ plu — ĉiu koro fariĝis nun poeta! Sentima koro sentas sian unuecon kun la naturo, ni ĉiuj entuziasme amas la naturon, nian patrinon!

---

## La batalo pro la vivo.

Tre malgranda loko suficas, por tie observi tiun ĉi batalon. Dum multaj jaroj mi posedis ĝardeneton, ĝi estis la paradizo, la elizeo de miaj infanoj. Meze de la gaja familia vivo mi ne multe atentis la malgrandan mondon de la kreaĵoj. Sed la infanoj maturiĝis, ili forlasis la domon, sola nun mi sidis en mia laŭbo, legante, pensante, meditante. For de la leteroj kaj libroj miaj rigardoj vagadis super la gutoj de l'roso, brilantaj kiel diamantoj kaj rubinoj.

Miaj floroj nun fariĝis miaj infanoj, mi deziris havi multajn, multegajn. Mi plantis, plantadis, kaj zorge flegis kaj vartis miajn florinfanojn. Bone sukcesis la kulturado, sed ho ve! Tro dense ili staris! Ili komencis batali: lilioj kaj papavoj ne permesis la vivon unu al la alia. Rozoj kaj diantoj fariĝis malamikoj, se unu el ili bone kaj riĉe floradis la alia kadukiĝis, preskaŭ mortis. Jasmeno eletendis la branĉojn kaj ne permesis la floradon de azaleoj. La modesta violeto pretendis al si la plej bonajn sunajn lokojn de la ĝardeno, replantita en ombran lokon ĝi

ne konsentis floradi. Sunon, aeron, liberan spacon miaj floroj postulis senĉese, la tutan tagon mi aŭdis la mutan sed tamen energian postulon. Mi ja volonte helpis, mi estonte nur plantis malmultajn karulojn, ricevontaj tial sufiĉe da spaco.

Sed jen aliaj malamikoj: la fruktarboj! Ili pligrandiĝis, ilia kreskado rabis la sunon kaj la roson al miaj floroj. Forhakigi la bonajn pomkaj pirujojn? Ne eble! —

Krom la vivanta, moviĝema mondo de la kreskaĵoj ankaŭ la mondo de la bestetoj altiris mian atenton, mi observis la papiliojn, abelojn kaj formikojn. Estis amuze, observi la abelojn forflugantajn de la papavoj kun grandaj violkoloraj pilkoj de florpolvo.

Ĉarmaj estis la delikataj papiloj ĉirkaŭflirtantaj la florojn! Sed malbona estis ilia idaro, la raŭpoj, manĝante miajn kreskaĵojn. Jen verdgrizaj raŭpoj, tiel similaj al la tiĝoj de la levkojoj, ke ili tute ne estis videblaj. Helverdaj, krispaj raŭpoj, same nevideblaj sur mia bela filiko, formanĝis la delikatajn foliojn, nudaj balailoj baldaŭ troviĝis en iam bela ĝardena angulo. La simileco de la raŭpoj al la filiko estis bona, instrua ekzemplo de „mimikry",*) sed malbona afero por miaj kreskaĵoj. Cetere miaj rozoj kun iliaj malamikoj! Ho, vi papilioj, mi komencis

*) mimikry, angla vorto: imitaĉo.

malami vin! Vi estas belaj, sed tre malutilaj bestetoj! Sed jen alia ofte laŭdata besteto: la formiko, eble ĝi estos helpanto. Mi aŭdis, ke la formikoj persekutas la rozpedikojn, mi do permesis al la formikoj havi siajn konstruaĵojn en mia ĝardeno, ofte mi observadis la laboreman, saĝan popoleton.

Sed kio okazis? La formikoj trouzis mian permeson, ili sennombre plimultiĝis, ili subfosis la herbejon, la florbedojn, ili difektis ĉion. Al ili fine apartenis la ĝardeno. Mi estis devigata komenci kruelan, senlacan militiron kontraŭ miaj iamaj amikoj — tre malagrabla afero!

Cetere la bestetaro! Ĉiuj kontraŭ ĉiuj! Enirinte la ĝardenon en bela septembra mateno, mi trovis centojn da grandaj araneaj retoj. La delikataj fadenoj estis malsekaj de nebuleto, la koloroj de l'ĉielarko aperis en ili. En la centro de ĉiu reto sidis la teksistino, atendante sian matenmanĝon. Granda muŝo enflugas, la araneo alkuras, envolvas rapide la vivantan, baraktantan viktimon. Jen papilio alflugas, la araneo ĝin rimarkas, forlasante la kaptitan muŝon ĝi avide atendas la papilion. Sed antaŭ ol ĝi atingas la reton, kato, sidanta sur muro, ĝin kaptas, disŝirante la delikatajn flugilojn! Ho ve, la bela mateno, mia paradizo!

## La vizito de la Ge-Sezonoj.

Vi ne sciis, ke la Sezonoj havas edzinojn? Ho, mi bedaŭras! Ĉiam la sama afero, kion ili ne vidas, la homoj, tio por ili ne ekzistas. Certe, ili havas edzinojn, ankaŭ Printempo havas tre junan edzineton, aŭ fianĉinon, tion mi ne scias. Kion tiuj ĉi gesinjoroj faras dum siaj libertempoj? Ili faras la saman, kiel ĉiuj personoj el la bona societo, ili vojaĝas. Ili vizitas diversajn regionojn, kie nun alia Sezono regas.

Kiam dum vintro okazas tago iom varmeta, la homoj malfermas la fenestrojn kaj diras: „Vera printempa tago hodiaŭ!"

Printempo ĝin aŭdas kaj sekrete ridetas, videbla li ja ne estas.

Kiam dum Printempo malvarmaj noktoj minacas la burĝonojn, la homoj kulpigas la stelojn kaj la lunon pro tio, ili ne scias, ke efektive gesinjoroj Vintro sekrete revenis. La poetoj ne povas rimi dum tia tago, ili parolas de „verde pentrita vintro."

Sed kiam la Ge-Vintroj dum somero revenas, la homoj tedas, mallaŭdas kaj malbenas senĉese. Ili insultas la senkulpan Someron per malafablaj vortoj:

,,Tio tute ne estas somero! Nia klimato plimalboniĝas! La tero malvarmiĝas," kaj tiel plu. La gajaj vojaĝantoj ridas, ili opinias, ke tio estas bona ŝerco. —

Foje ĉiuj Ge-Sezonoj kune vizitis la vilaĝon Blanka Cervo. Estis belega Oktobra tago, ĉiuj feinoj de la tuta ĉirkaŭaĵo ankaŭ estis venintaj, ripozante sur la herbejo ili gaje babiladis. La gastoj rakontis, ke la tuta mondo nun estis tre okupata per la rikolto, per manovroj kaj per ĉasplezuroj, tial ili venis al Blanka Cervo por trovi trankvilan, senlaboran lokon. Dum la tuta interparolado la feinoj de la parko bone prizorgadis, ke Somero ne piku per tro granda varmo, kaj Vintro ne malhelpu per malvarmo, estis bonŝanca afero, ke la gesinjoroj venis kune. Nur la Ge-Printempoj estis permesataj fari kion ili volis. Sekrete ili ornamis la tutan herbejon per miloj da trikoloraj violetoj kaj dissemis novajn burĝonojn tien kaj ĉi tien.

Neatendite s-ro Somero demandis: ,,Miaj karaj, kial vi ne havas rikolton tie ĉi? La feinoj ridis kaj diris: ,,Ĉar ni ne havas kampojn, vi ja nur vidas arbojn kaj erikejon." S-ino Vintro demandis: ,,Kial ne estas manovro tie ĉi?" ,,Ni estas pacemuloj." ,,Kial oni ne ĉasas tie ĉi?" Aŭtuno diris: ,,Foje en antikva tempo oni kurĉasis tie ĉi blankan cervon. La bela, timigita besto serĉis rifuĝon en reĝa vinberplantejo. De tiu

tempo ni ne mortigas la bestojn, ni tion ne amas."

,,Sed kial vi ne rikoltas vinberojn, ĉu vi estas gesobruloj?" ,,Tute ne, sed nia vino estis tro acida, ni forigis la vinberujojn por konstrui anstataŭe belajn somerloĝejojn."

,,Sed ion vi nepre devas havi, kion ni rakontos pri nia vizito ĉe vi. Montru al ni viajn vidindaĵojn!"

Nun la Ge-Aŭtunoj sin levis, ili okulsignis al la feinoj, kaj per facilaj, flugaj paŝoj migradis tra la parko por montri ion al la gastoj. Baldaŭ la tuta feinaro atingis grandan, strangan konstruaĵon. Meze en la parko ĝi staris, kiel kastelo de „Dornrozeto", oni nur vidis altan barilon aŭ bretan muron. ,,Kio tio estas?" ,,Atendu!" Kaj la feinoj ebligis la enrigardon. Jen, homoj gaje promenantaj, gimnastike ili sin movadas, ili balanciĝas gracie en delikataj maldikaj vestoj: estas la aerbanejo de Blanka Cervo. La Sezonoj surprize rigardis tiun belan vidiĝon, kaj diris: ,,Tio ja estas vera feinaĵo, estas tute mirinda afero." ,,Certe", respondis la gastigantoj, ,,kaj pripensu, ke hodiaŭ estas la 22a de Oktobro, kaj ankaŭ tion, ke Germanujo ne estas suda lando." Printempo ridetis kaj sekrete diris al sia karulino: ,,De la unua de Marto ni tie ĉi regos!"

Afable dankinte la vizitantoj nun adiaŭis kaj alien flugiradis.

## La Bono.

La bono estas la senescepta helpado al la bonfarto de la vivantoj. Kiam la homoj komprenos, ke ili estas kvazaŭ unu korpo, ili neniam malhelpos kaj pereigos unu la alian. La bono do celadas al la ideala stato de la paco.

## La Belo.

La homoj nomas bela tion, kio estas agrabla al iliaj sentoj. Ŝatado de l'belo estas unu el la proprecoj de la homo. Ĝi lin puŝis al la arto kaj al la ornamo. Per la spegulo de la arto li ekvidis la originon de l'belo, la naturon.

## La Vero.

Ekzistas nur unu vero. Scikoni la veron estas la plej grava celado de l'homo. Ne per meditado li konos la veron, li ĝin nur trovos per senlaca esplorado de la naturo, sen ia antaŭjuĝo. Per tio li venkos iom post iom erarojn, gajnos klarecon kaj fine vidos la veron.

Neniel la vero estos terura, kontraŭe, ĝi estas bela kaj trankviliga feliĉo.

## Nokto, la amikino de la homoj.

Sur la malproksima, malluma ĉielo briletas helaj steloj. Kviete la tero kuŝas en profunda dormo, kiel senzorga infano. Pasis ĉio, kio tage turmentis la homojn, la nokto donas trankvilon al la koroj, kiuj batis tiel laŭte kaj zorgplene.

La nokto estas la vera amikino de la homoj. Kiel bona patrino ŝi alportas al ili pacon, forgeson de la malĝojo. Malrapide kaj afable ŝi paŝas sur nia tero en sia nebuleta vesto, ĉiun ĉagrenon kaj doloron ŝi forprenas de la homoj. Kaj mallaŭte ŝi forlasas la teron kun afabla rideto. —

Kaj kiam nun la nova tago alvenas, li trovas la homojn kun nova forto nova espero.

Facilaj ŝajnas al ili la laboroj kaj la devoj, ĝoje kaj danke batas la koroj.

Bela nun estas por la homo la vivo, li ne timas la danĝerojn, denove li amas la mondon, ĝoje li salutas la belan verdan teron!

## Ĉielaj imagoj.

Preskaŭ ĉiuj popoloj kredas postmortan vivon, ili imagas iun ajn lokon, kie la animoj ekzistas. Tiuj ĉi lokoj havas diversajn nomojn, laŭ la ideo kaj fantazio de la popolo.

La animoj vagas kiel fantomoj sen ripozo kaj paco en la proksimeco de la tombejoj aŭ en la vasta aero, ili ankaŭ trankvile sin trovas en ia kvieta, nekonata loko, kvazaŭ en paca familia rondo. Ili ankaŭ sin alten levas, super la steloj de la ĉielo, kie ili ĝuas feliĉegan vivon en lumo kaj radioj. Aliaj animoj migradas kiel ombroj en duonhelaj subteraj lokoj, sen doloro, sed ankaŭ sen ĝojo, la akvo de la forgeso estingis ĉiun memoron. Tre belajn nomojn oni donis al kelkaj transaj lokoj: paradizo, elizeo, eterna urbo, ĉiela regno, edeno, insulo de la feliĉego ktp.

Malĝoja epoko elpensis la plej teruran aĵon: la malon de la paradizo, la teruran inferon, kie la malfeliĉaj animoj suferis eternajn punojn por tempaj pekoj. La dolĉa reĝino „Fantazio" ankaŭ por tiuj mallumaj imagoj donis sian helpon, por ke des pli brilanta fariĝu la bildo de la ĉiela vivado.

Ofte la transejo rebrilis la ĝojon de la tera vivo, la alia mondo estis spegulo de la ĉi tiea: la animoj eniris en la halojn de batalado aŭ en eternajn valojn de ĉasado. Kelkaj popoloj per tre riĉa fantazio ornamas la ejon de la transmorta vivo. La eternigitaj estas bele kaj lukse vestitaj, solena muziko trasonas la vastajn brilantajn halojn aŭ la freŝajn florĝardenojn, flugilhavaj estuloj aŭ belaj junulinoj flugiradas tien kaj reen, oni nomas ilin anĝeloj, ĉielaj senditoj kaj hurioj.*)

Dolĉaj, ĉarmaj sentoj, eterna ĝojo, daŭra serena gajeco, juneco kaj beleco feliĉigas la animojn. Paradiza sentado kompensas ilin pri teraj suferoj. Senfina, neesprimebla ĝojo ilin ĉirkaŭas.

---

*) Ĉielaj virgulinoj laŭ mahometana kredo.

## Internacieco.

Estas rimarkinda fakto, ke la plej simplaj verajoj estas tre malfacile troveblaj. La homaro bezonas multajn miljarojn por kompreni ilin, ĝi kvazaŭ estas blinda kaj surda, ĝis fine la vualo, kaŝanta la veron, malaperas. Nun la homoj miras kaj ĝoje akceptas la „novan senton."

Tia nova sento estas la ideo de la internacieco, pli simple dirita, la kompreno, ke la homaro nur estas unu familio, ke ni ĉiuj estas fratoj. Certe, jam de longe profetoj kaj poetoj tion antaŭsentis, la milda Buddha kaj la helpema Jesuo predikis tiun ĉi dolĉan dogmon, sed nur malmultaj homoj komprenis la altan sciencon. Riveroj de sango fluis pri religiaj aferoj, malamikeco dividis la popolojn, ili starigis murojn unu kontraŭ la alia: estas preskaŭ miraklo, ke ili ne pereigis sin reciproke. La bestoj jam de longe lernis, ke la raso ne devas interbatali, la homoj tion ne sciis. Ili ne sciis, ke ili estas kvazaŭ unu granda teksaĵo, aŭ reto, kies fadenoj estas interligitaj, tial ke disŝiro de unu maŝo malhelpas la tutan reton. La homaro ne sciis, ke ĝi estas

unu korpo, ke vundo de unu parto malsanigas la tutan korpon.

Kiel tio povis okazi? Kial oni ne komprenis la instruadon de la fondintoj de religioj? Jen eble la kialo! Apud la pacaj, religiaj paroloj kaj samtempe kun ili oni predikis la dogmon de la nacieco, de la patriotismo. Kaj tiu ĉi patriotismo enhavis kaj envolvis la ideon de la malamikeco kontraŭ la najbaro. Certe, se la najbaro estas malbonulo, kiu rabas al mi bienon kaj posedaĵon, mi devas protekti kaj defendi min, sed se li estas trankvila homo, ne ekzistas motivo por malamikeco. Ĉiu homo amas sian familion, ĉu rezultas do el tio, ke li devas malami ĉiujn aliajn familiojn? Certe ne, kontraŭe li bezonas la helpon kaj la kunlaboradon de la najbaroj, tial estas saĝe, ne persekuti ilin. Ni bezonas la aliajn homojn, tiu ĉi simpla, evidenta ideo iom sin trudas al la homoj, ĝi estas la origino de la internacieco.

Izoleco ne plu estas ebla. Ĉiu lando bezonas la produktaĵojn de alia lando; nutraĵoj, teksaĵoj, metaloj estas al ni necesaj. Tion de longe sciis la komercistoj, tial paceme ili travojaĝis la mondon, ili ligis la unuajn rubandojn inter la popoloj. Al ili sekvis la scienculoj. La scienco, la literaturo estas posedaĵo de la tuta mondo, la historion de la homoj, bestoj kaj teraĵoj oni ne povas

studadi nur en sia propra nacio, oni bezonas la tutan mondon.

Por tiu ĉi klopodoj kaj celadoj (ilia nombro estas senlima) la diverseco de la lingvoj estis ĉiam granda malhelpaĵo. Sed la homoj opiniis, ke tio ne estis ŝanĝebla, ili sin helpis tiel bone kiel eble per tradukantoj kaj interpretantoj. Ili sentis la grandan baron — forigo ne ŝajnis farebla, ili eĉ tion ne volis kaj deziris, estis ja tiel la volo de Dio. Krom tio bona patrioto nur amas sian patran lingvon kaj malamas la lingvon de aliaj patridoj. Densaj vualoj kaŝis la fakton, ke la diverseco de la lingvoj nur estas la sekvo de la disigo de la gentoj per montaroj, riveroj, maroj aŭ per la forta volo de potencaj reĝoj, ke la lingvoj nur estas dialektoj, aliformiĝadoj de la homa esprimmaniero. Modestaj pensuloj iom post iom antaŭsentis tiun veraĵon kaj fine, kiam la tempo alvenis, ke la mondo efektive bezonis komunan internacian lingvon, la viro naskiĝis, kiu solvis la problemon, kiu elpensis neŭtralan lingvon simplan, belan, bonsonan, nian karan ESPERANTON.

## La grafo Zeppelin.

La kvina de Aŭgusto 1908 estis maldolĉa tago por Germanujo. Ĉie oni vidis seriozajn mienojn, ĉagreno kuŝis sur la trajtoj de la homoj, malgaje ili trairis la stratojn, staris en grupoj, legis afiŝojn. En la restoracioj oni nek ludis, nek babiladis. Kio do okazis? Ĉu eminentulo mortis? Ĉu ia granda banko bankrotis? Kial la tuta nacio funebras? La aerŝipo de la grafo Zeppelin bruliĝis! — De la Bodensee ĝis Mainz la grafo intencis veturi per la nun fine direktebla ŝipo, la loĝantoj de tiu ĉi distrikto sekvis la maltiman aerveturiston kun liaj fideluloj per la okuloj, la aliaj germanoj lin akompanis kore kaj anime. Kaj nun la ŝipo bruliĝis! Kiam la unuaj telegramoj venis, oni ne certe sciis, kiamaniere la malfeliĉo okazis, oni nur legis: La grafo estas vivanta sed senkonsola! Nun ia granda komuna sento kaptis milionojn da koroj: vivega kompato! Kompato je viro laboradinta dum multaj jaroj por sia ideo, je viro kiu solvis unu el la grandaj problemoj de la homaro, kaj nun vidis la pereon de sia tuta laboro.

Por bone kompreni la grandegan emocion oni bonvolu pripensi la tutan fariĝadon. Antaŭ unu jarcento leviĝis la unuaj „Mongolfieroj“ kaj „Blanchardoj“, la homoj preskaŭ freneziĝis pro admiro kaj espero. Sed la dua solvo de la problemo ne estis trovebla: la direktado, la ebleco veturi kontraŭ la vento! La 19a centjaro estis vera jaro de eltrovaĵoj, ŝajnas, ke en la mondo ĉiuj knaboj naskiĝis kun inĝeniera talento, ili ĉiuj estis malgrandaj elpensintoj. Ofte oni diris al talenta knabo: „Vi iam elpensos la direkteblan aerŝipon!“ Tamen la knaboj fariĝis viroj, ili elpensis mirindajn maŝinojn, la biciklon kaj la aŭtomobilon, sed ne la aerveturilon. La espero perdiĝis, la intereso por la afero ekdormis, la aeronaŭta milita sekcio estis flanka afero kaj ne altiris grandan atenton.

Sed la ideo mem ne perdiĝis. Ĝi vivis en la animo de juna nobelo, la grafo Ferdinando de Zeppelin. Li naskiĝis la 8an de Julio 1838 en Konstanz ĉe Bodensee, kaj elektis 20 jara la militan karieron. En diversaj militiroj li montris kuraĝegon kaj riskemon, dum lia partoprenado ĉe la milito en Nordameriko (1863) li havis okazon kunsupreniri en katenbalono. De tiu ĉi tempo la ideo de direktebla aerŝipo lin ne forlasis. Antaŭ la komenco de la milita kariero la nobela junulo vizitis kelke da tempo la teknikan lernejon en

Stuttgart, tio al ni montras lian inklinon. Dum dek jaroj li nun senĉese pensis, kalkulis kaj meditis, en la jaro 1873 la plano estis elpensita. Sed nur en la jaro 1890 la grafo eksiĝis el la oficira kariero, de tiu ĉi tempo li tute sin dediĉis al la efektivigo de la granda ideo. Sekvis jaroj de senlaca laborado. La ofero de granda parto de lia havo, la akiro de fremda mono kaj ĝia administrado, la instruado de metiistoj kaj laboristoj plenigis la vivon de la grafa inĝeniero. Li lernis uzi la ecojn de aluminio kaj de benzino, li trovis la helpon de sindonaj kunlaborantoj. Unu eksperimento post la alia ne bone sukcesis, ĉiam denove li komencis. La mokoj ne mankis: li estis utopisto, malbonuzante forton, monon kaj tempon. Sed obstine li iris sian vojon al la deziregata celo, kaj fine, preskaŭ surprize por la mondo, li solvis la problemon. Lia balono estis direktebla, obeeme ĝi sekvis la direktilon, iris kien ĝi devis kaj revenis kiel bone dresita ĉevalo al sia ejo. La dubema, singardema, nekredema germana popolo aŭdis, vidis kaj miris. Ne eble! Tamen fakto! La ŝipo taŭgas kaj estas uzebla. La Wirtembergaj gereĝoj riskas vojaĝon per la aerveturilo — — kia konfido, kia alta aprobo!

Pli granda vojaĝo devis sekvi, grandaj longaj vojaĝoj ja estas la klare kaj ofte de la grafo definita celo de l'direktebla balono. Oni ne

konis la precizan daton, telegramoj ĝin anoncis ĉien. En tiu ĉi momento de la plej alta simpatio okazis la terura akcidento! — Post kelke da tagoj, aŭdinte ke la grafo nek perdis la kuraĝon, nek timas novan laboron, la germana popolo eksplodis en neaŭdita entuziasmo. La kompato ŝanĝis je pasia helpamo, el miloj da fontoj elfluis mono, la monon oni akompanis de sennombraj vortoj de aprobo kaŭ laŭdo. La nobla karaktero de la grafo, lia persisto kaj energio lin faris heroo. Krom tio oni sentis, ke al la homa intelekto prosperis nova venko. Prometeŭs' al Zeŭso rabis fajreron por feliĉigi la homojn, Franklin katenis la fulmon, foriginte de la homoj timigan teruron, Zeppelin lernis regi aeron kaj ventojn, li ankaŭ solvis problemon!

Ni iras saman la vojon
Al sama celo kun li,
Se vane unuan la fojon,
Denove komencas ni,
Havante fervoran dediĉon
Por krei la homan feliĉon.

---

## Letero al la regnanoj.

Karaj regnanoj!

Kiam mi legis en la Revuo la ĉarman leteron de D-ro Bein al „Ŝia Reĝina Moŝto“, mi vidis, ke tiu ĉi letero ne estas adresita al mi persone, sed al la ideo de la Floraj Ludoj, ĉar la aŭtoro de la letero diras, „ke ŝia Reĝina Moŝto ĝojigis sian fidelan popolon per siaj verkoj!“ Precipe li parolas pri la rezultato de la proza sekcio, li petas, ke la Reĝino ne forgesu danki al la komitato kaj al la juĝantaro.

Tiun ĉi peton nun mi volas plenumi, ne kiel sinjorino Hankel, sed kiel la „Reĝino“, laŭ la saluto de D-ro Bein.

Mi do esprimas mian sinceran dankon unue al la elpensinto de la Floraj Ludoj, al S-ro Carlo Bourlet. Nenia afero aperas subite, sen preparo, tial la Unuaj Floraj Ludoj de la Esperantistaro elvenis el la kutimo de la Revuo, disdoni premiojn por bona verkado. El tiu ĉi kutimo elvenis la ideo de S-ro Bourlet, direktoro

de la Revuo, imiti la belan katalunan kutimon de la Floraj Ludoj. Al S-ro Bourlet kaj al liaj fervoraj helpantoj, D-ro René Artigues kaj Barono de Ménil, mi do diras mian varman kaj admiran dankon. Ne estis facila tasko, organizi la unuan fojon tian grandan entreprenon, multon la tri sinjoroj devis pripensi kaj prilabori, por elekti la ĝustan vojon kaj taŭgan juĝistaron.

La duan, simile varman dankon mi esprimas al la tri prezidantoj de la juĝantaro, al la honorindaj sinjoroj A. Grabowski, D-ro K. Bein kaj al R-ro E. Boirac. Malfacila kaj responda estis ilia tasko. Ili sciis, kiom dependis de ilia juĝo, ili deziregis meriti la konfidon al ili esprimitan. Ilia decido devis esti ĝusta kaj kontentiga por ĉiuj. Koran dankon per plej varmaj vortoj mi do deziras esprimi al la honorinda prezidantaro, la tri sinjoroj efektive meritas ordenojn kaj honorajn titolojn. La trian dankon mi esprimas al la 42 juĝantoj, kiuj per sindona laboro efektivigis la praktikan taskon, ekzameni la plej diversajn verkojn. Ili oferis sian tempon kaj forton, flankenlasis proprajn laborojn por studadi prozajn kaj poeziajn manuskriptojn. Ili legis kaj relegis la verkojn, kvazaŭ prilaborinte ilin, por eltrovi la plej bonajn. Ĝustatempe unu juĝanto forsendis la kolekton da verkoj al la dua aŭ tria juĝanto, loĝanta en

ia malproksima lando. Tiu ĉi sindona juĝantaro meritas mian plej sinceran dankon.

Ankoraŭ unu danko kuŝas en mia reĝina koro, kiun mi deziras esprimi. Mi diras mian varman dankon al ĉiuj gekonkursintoj, ĉar ili ebligis la tutan feston. Per sia fervoro ili sin montris kiel la vera diligenta kolegaro. Ili ĉiuj sentis sur sia frunto la kison de nia kara estrino, la Esperanto. Esperanto, nia kara lingvo, plena je belsono kaj moleco estas la poezio mem. El tiu ĉi kaŭzo la Esperantistoj tiel multe ŝatas ion verki, tial la literaturo surprize rapide kreskas, tial tiom da verkoj estis alsenditaj. Ili ne estis verkitaj nur pro la premioj, multaj el ili jam estis konceptitaj antaŭe. La konkurso de la Revuo por la Floraj Ludoj nur donis la finan iniciaton al la verkistoj, ellabori siajn ideojn.

Al la kunlaborintoj do mi esprimas mian dankon kaj samtempe la deziron, ke ili daŭre kaj senlace laboru. Mi petas, ke ili ne nur verku sed ankaŭ legu, ke ili ĉiel kulturu la florojn en mia regno,

la floradon de nia juna originala
Esperantista literaturo.

La Reĝino de la Floraj Ludoj.
Dum la jaro 1909/10 reprezentita per Marie Hankel.

## D-ro Esperanto.

La gramatiko de l'Esperanto estas neŝanĝebla, same kiel en iu ajn vivanta lingvo. Tiu ĉi postulato estis akceptata de la unua Esperantista Kongreso en Boulogne s. m. (1905) kaj estas jesigita de la sekvantaj kongresoj. Tute same tiel, kiel la lingvo estis instruata kaj uzata de post ĝia naskiĝo, ĝi ankaŭ estos instruata kaj uzata en estonteco. Pliriĉigado de la vorttrezoro fariĝos kun la aprobo kaj konsento de Lingva Komitato kaj de Akademio.

El tio estas videble, ke ankaŭ Esperanto havos sian evolucion. Ĝi evolucios kiel kreskaĵo el greno. Tiu ĉi komparo nevole al ni sin trudas, se ni havas la feliĉon ekvidi la unuan lernolibron de l'Esperanto, eldonitan en la jaro 1887. La titolo de tiu ĉi libreto estas:

Dr. Esperanto. Internacia Lingvo.

(Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Prezo 40 pf.)

Mi posedas unu el la nun tre maloftaj germanaj ekzempleroj, kompreneble ankaŭ la titolo estas germana.

La antaŭparolo estas la plej granda parto de la libro, ĝi enhavas 19 paĝojn. Ĝia traduko Esperanta sin trovas en la „Fundamenta Krestomatio“, paĝ. 241. Sekvas nun 6 provoj de la nova lingvo: Patro nia, El la biblio, Letero (prozo) kaj Mia penso, En sonĝo, Ho, mia kor', (poezio). Nun pluajn 8 paĝojn de germana teksto pri la disvastigado de la estonta lingvo, kaj tiam aro da aldonitaj blankkartoj kun la promeso lernvoli la lingvon.

Fine ni trovas la ĉefaferon, paĝo 43 ni legas:

Plena Lernolibro de la Internacia Lingvo.

La „plena lernolibro“ estas nenio alia ol la 16 reguloj de nia fundamento! (Krestomatio pĝ. 254). Nenia gramatiko, nenia sintakso. Sur malligita folio ni cetere trovas la vortaron, 900 vortojn. Tio estas ĉio! El tiu ĉi ĝermo la fiera arbo de nia lingvo elkreskis, ĝi do efektive ĉion enhavas, kio estas necesa por lingvo internacia. El la ĝisnuna evolucio de l'Esperanto tri gravaj punktoj estas elkoneblaj.

Unue: la fundamentaj 16 reguloj ne devas esti ŝanĝotaj. Ili estas la ĝermo, kaj tial la kaŭzo de l'rezultato, de la lingvo mem.

Due: la vorttrezoro daŭre povas kaj devas esti pligrandigota, tio ne estas danĝero por nia lingvo. Tamen oni agu ankaŭ je tio singardeme.

Kiam vorto ne estas formebla el la radikvortoj kaj kiam ĉirkaŭfrazo ŝajnas tro malsimpla, tiam bonaj verkistoj risku novan vorton kiel eble plej internacian, sed nur kvazaŭ kiel proponon. La Esperantistaro, kaj fine la akademio konsentos aŭ malkonsentos la akcepton. Sammaniere oni ankaŭ definu la fakesprimojn por ĉiuj metioj. La antaŭlaboroj estu efektivigotaj laŭ la principoj proponitaj de D-ro Zamenhof. Tiun ĉi taskon la venonta jardeko plenumu.

La tria punkto estas la stilo. Ĝi estas evoluciebla spite la neŝanĝebleco de la 16 fundamentaj reguloj. Ĝi fariĝos ĉiam pli bela, eleganta, simpla kaj facile uzebla, nia diligenta kolegaro neniam laciĝos en tiu ĉi alloga laboro. Ni esperu kaj laboru!

---

## Meditoj.

Kia estas la karaktero de nia Majstro?

Ĉu li havas oran aŭ vaksan koron?

Provu mem, viaj vortoj lin impresos, sed baldaŭ vi sentos kaj spertos la oran metalon de la interna kerno.

Lia animo similas al ŝtala risorto, ĝi estas cedema, sed nur ŝajne, fortege ĝi kontraŭstaras premadon.

Lia persono similas diamanton en skateleto, metu ĝin en sekrete kaŝitan ŝrankofakon, ĉiam ĝi estas diamanto.

Lia verko havas eternan daŭron, ĝi nek estas detruebla nek perdebla.

Se per milito, tertremo aŭ brulado nia tuta esperantista literaturo malaperus, ĝi baldaŭ ekaperus denove.

El kio?

Ĉu la reguloj de nia lingvo estas skulptitaj sur roko?

Certe, ili estas skulptitaj sur rokon vivantan, sur la koron de la homaro!

Nur unu fojon Prometeŭs alportis al la homoj la fajron, eterne ili ĝin gardadis.

Nur unu fojon alia ĉiela sendito alportis al la homoj lingvon internacian, ankaŭ ĉi tiun donacon ili zorgeme gardos, neniam ili ĝin ellasos el la manoj.

---

## La deka muzo.

Trankvile kaj senzorge mi dormis, agrable mi sonĝis, kompreneble pri Esperanto. La antaŭan vesperon mi klarigis al kelkaj samideanoj mian metodon por lernigi la tabelvortojn. Ĉar mi opiniis mian metodon treege bona, mi ĝin rekomendis fervore. Ĝi estas la jena. Mi diras dum la tria aŭ kvara leciono al la gelernantoj: „Karaj amikoj, en nia lingvo ekzistas aro da vortoj, kiujn oni aranĝis laŭ tabelo. La lernado estas tre facila, se oni apartigas la unuajn naŭ vortojn je tri grupoj. Ni lernu hodiaŭ la unuan grupon, ia, ial, iam. Ĉiu vorto komencas per i, sekvata de a. Vi vidas, ke tio estas alfabeta ordigo." Nun mi priparolas la tri vortojn, donante sufiĉe da ekzemploj. La sekvantan lecionon mi klarigas la duan grupon, ie, iel, ies. Mi atentigas la lernantojn, ke ankaŭ la vortoj kun e estas alfabete ordigitaj. Poste venas la tri vortoj kun mallumaj vokaloj: io, iom, iu. Kiam ĉiuj naŭ vortoj estas bone komprenitaj kaj firme lernitaj, mi aldonas la k, t, ĉ kaj nen, pro la logikeco de tiuj ĉi signoj la lernado

fariĝas vera plezuro. — Kaj nun mi dormis kaj dolĉaj sonĝoj min ĉirkaŭflugetis. Subite blanke vestita feino staris apud mia lito. Mi tute ne miris, feinoj estas bone konataj estaĵoj en Esperantujo. Per melodia, arĝenta voĉo ŝi komencis paroli. „Mi estas muzo“, ŝi diris, „la deka muzo, muzo de l'Esperanto. Mi volas ion al vi malkaŝi, kion vi ne ankoraŭ rimarkis. Vi havas en via germana lingvo peceton de la fama tabelo, aŭdu: Wann — dann, was — das, wer — der, wie — die, wo — do, (ŝi diris do!) wessen — dessen, wesshalb — deshalb, warum — darum!“

Ekkaptinte krajonon mi ekvokis: „Bonege, ni ordigu la vortojn alfabete!“ Sed la feino malaperis kaj mi vekiĝis.

Mi rapidas al vi, geamikoj, por rakonti mian sonĝon. Ĉu vi jam rimarkis, ke ankaŭ nia tabelo estas natura posedaĵo de vivanta lingvo, majstre enplektita en Esperanto?

## Fabelo.

Kiam Esperanto ekaperis en la mondo, ĝi estis kvazaŭ knabo, vigla, forta kaj sana. Printempa juneco lin ornamis, liaj okuloj briletis, per flugaj paŝoj li facile moviĝis. Liaj vestoj estis malpezaj, ili konsistis el dekses delikataj rubandoj, lerte unuigitaj. La ĉarma knabo plaĉis al homoj, kiuj amis naturon, belecon kaj esperon. Al li apartenis la estonteco, rapide kaj celcerte li iris sian vojon.

Survoje nia knabo renkontis honorindajn virojn, kiujn oni nomis gramatikistoj. Ili tre afable rigardis la knabon, iliaj maljunaj koroj varmiĝis, vidante liajn esperplenajn okulojn. Sed ili rimarkis ion, kio ne al ili plaĉis. „Knabo mia", ĉiu el ili diris, „kun tia vesto vi ne povas tramigri la mondon. Ĝi estas tro maldika, vi tremfrostos, ĝi estas tro mallonga, tio ne decas, vi devas ankaŭ kovri brakojn kaj piedojn!"

La gramatikistoj tiam alportis multajn teksaĵojn, ili zorgeme kaj bone vestis la knabon de l'kapo ĝis piedoj, fine ĉiu membro estis dekfoje tegita. Nia knabo tre miris, sed ĉar la sinjoroj

gramatikistoj ŝajnis afablaj kaj tre helpemaj, li danke ĉion akceptis. La delikata ĉemizo el dekses rubandoj ne plu estis videbla, multaj vestaĵoj ĝin malaperigis. La junulo nun ne plu fluge marŝadis, tre singardeme li malrapide kaj pene iradis. . . . .

Ĉu tio longe daŭros? Eble li ian belan tagon forĵetos la superfluajn kovrojn, en sia primitiva vesto, taŭga, daŭra kaj nedeŝirebla, gaje ridetante li staros antaŭ la mirigitaj okuloj de la gramatikistoj.

---

## Kial ni ne devas ŝanĝi Esperanton.

La respondo al tiu ĉi demando ne estas tiel facila, kiel fidela fundamentulo eble kredas. Kie kuŝas la grava kialo, malpermesanta ŝanĝojn? Ŝanĝado aŭ aliformigado ja ne estas krimo, krom tio, ĉio sur nia tero senĉese ŝanĝadas. La malo de tio, la neŝanĝado ne ekzistas, „ĉio fluadas“. La moroj kaj kutimoj de la popoloj en ĉiu centjaro montras diversajn formojn. La leĝoj, la formo de la regado, la religioj, la artoj, la kostumoj kaj la amuzaĵoj ne restas sen ŝanĝo, kvankam la inklino al konservado estas forta homa propreco.

Plej ŝanĝemaj estas la lingvoj. La popoloj ne havas la intencon ilin ŝanĝi, kontraŭe, la nacia sento, la kutimo kaj la tradicio igas ilin paroli same, kiel gepatroj kaj geavoj parolis. Lingvo Internacia (N-ro 1, XV[a] jaro) enhavas tre interesan mallongan artikolon pri la evolucio de la Indo-Eŭropaj lingvoj. Al unu el la du grandaj Aziaj subgrupoj apartenas la sanskrito, kiu je 1000 jaroj antaŭ Kristo havis sian klasikan floradon. Ĵaluze la pastroj penadis konservi la belajn sanktajn

himnojn, feliĉe ili estis savitaj de la pereo, sed senhalte la lingvo ŝanĝis, ŝanĝadis, ĝi hodiaŭ nur vivas en tre aliformitaj hindaj dialektoj.

Ian similan ni vidas en Eŭropo. La lingvo latina havis tre riĉan, belan literaturon, ŝatatan ĝis la hodiaŭa tago, krom tio ĝi estis eklezia lingvo. Tamen ne estis eble daŭrigi ĝian parolan uzadon. Ĝi ne mortis, certe ne, ĝi estas parolata en ĉiuj romanaj landoj. La latina lingvo estas parolata france en Francujo kaj hispane en Hispanujo — sed kiom ŝanĝita!

Iom pli simila al la antikva greka lingvo estas la nuna grekaĵo. Tamen, ankaŭ en Grekujo ne estis eble konservi la noblan formon de la atika dialekto el la epoko de l'Perikleso, senkompate la tempo antaŭen marŝadis, neniam haltante.

Kaj nun, kio fariĝos Esperanto, artefarita lingvo, en tiu ĉi senĉesa movado? Ĉu ĝi ne similas al delikata rozofolio, ĵetita sur riveregon? Ĝi estas nuksoŝela boato sur ondegaro, ruliĝanta super abismoj kaj kataraktoj. Kian aspekton ĝi havos post centjaroj? La kontraŭuloj de nia ideo profetas nian certan pereon. Ili diras: vi aŭ partoprenos al la natura evolucio, tiam vi perdos vian unuecon, aŭ vi evitos leĝe ĉiujn ŝanĝojn, tiam vi ŝtoniĝos.

Tamen ni evitos la du danĝerojn, la rimedoj jam estas trovitaj.

Jen la tri fortaj iloj por nia daŭrado:

1) Neŝanĝebla fundamenta regularo.
2) Akademio aŭtoritata, kiu ĝin konservas.
3) Praktika uzado de nia lingvo.

Tiu ĉi triobla fortikaĵo protektos Esperanton. Ĉiuj tri estas nepre necesaj. Se nur unu el ili mankus, Esperanto havus la sorton de sanskrito, de greka kaj latina lingvo.

Sen la tri fortoj — certa, pereo! Kun ili, verŝajna, eĉ certa daŭrado.

Esperantistaro, vi posedas trezoron. Ne ĝin perdi, tio estas via sankta, grava tasko.

Uzu la tri fortojn nomitajn por eviti la pereon: neniam ŝanĝi estu via sankta parolo.

## Nia lingvo.

„De la tempo, kiam la esperantistoj ĉesis paroli pri reformoj, komenciĝis por Esperanto periodo ĉiam pli kaj pli brilanta.“

Tiuj ĉi vortoj de D-ro. Zamenhof en sia parolado dum la kvara kongreso esprimas la plej gravan fakton de nia movado. De la tempo— de kiam do komenciĝis la ekflorado de Esperanto? Estis la tago, kiam oni decidis, ke la lingvo Esperanto devos tute sen ia ŝanĝo resti en sia ĝisnuna formo: la voĉdona tago de la 11ª de novembro 1894.

En tiu ĉi tago la esperantistoj malakceptis la ŝanĝojn proponitajn de la D-ro. Zamenhof! — Kiu deziras akiri tute klaran juĝon legu mem la gazeton „Esperantisto“ de la jaro 1894, ĉiu raporto nur montras parton de la treege interesa afero. Ni nur aldonas la gravan fakton, ke D-ro Zamenhof energie nuligis sian ŝanĝproponon, dirante, ke ĝi estis bona en teorio sed ne en praktiko. De tiu ĉi tempo oni ĉesis turmenti la elpensinton de Esperanto pro ŝanĝoj, oni sekvis lian peton, petegon—labori! Ĝis nun pres-

kaŭ nur li, la doktoro, laboris, la esperantistoj malhelpis per ŝangproponoj, per senagado, per malrapideco. Kortuŝaj estas la vortoj per kiuj D-ro Zamenhof akompanis la anoncon de la ŝanĝota lingvo. La ŝanĝado ŝajnis al li kvazaŭ la lasta rimedo por savi la ideon de internacia lingvo. Por vivigi ĝin, D-ro Zamenhof deziris, tuj post la akcepto de la ŝanĝoj rapide krei grandan literaturon (bibliotekon, kiel li diris), pro tio li alvokis la helpon de la amikoj. Jen liaj vortoj: „Mi petas ilin, forĵeti sian dormadon, sian paralizigan: „oni faros sen mi", mi petas, ke ĉiu alportu sian briketon al nia konstruo. El gutoj fariĝas maro, sed se ĉiu konservos sian guton en sia poŝo, dirante „la maro fariĝos aŭ ne fariĝos sen mia guto", tiam nenion estos eble fari. Jam tiom multe da fojoj mi vane alvokadis la helpon de niaj amikoj! Mi esperas, ke almenaŭ nun mia voko ne restos senfrukta." —

Ni jam diris: la sorto feliĉe decidis, ke la ŝanĝoj ne estis akceptataj, la lingvo restis kiel ĝi estis, en sia originala, genia formo. Sed la amikoj nun efektive maldormiĝis, ili laboris kaj helpis, ili skribis, tradukis, verkis, — eldonistoj troviĝis, 1903, naŭ jarojn poste, la krestomatio aperis, ni ricevis nian literaturon — ni nun havas la bibliotekon de D-ro Zamenhof deziritan. La gutoj fariĝis rivero, la riveroj fariĝos maro.

En la nuna tempo, 14 jarojn post la kriza momento, denove aperas ŝanĝproponoj, Tiun ĉi fojon ne proponitaj de la Majstro mem, sed de grupo de esperantistoj, kiuj ne komprenis la fakton, ke reformemeco en la nuna stato nur malhelpus la grandan ideon. Ĝi alkondukis skismon, rabis al la mondo la konfidon ĵus penplene akiritan, malcertigas aŭ prokrastas la venkon.

Tial ni devas batali kontraŭ la reformistoj, kaj samtempe duobligi nian laboron, senĉese ni alportu briketojn, sablerojn, gutojn! Ni laboru kaj esperu! (1909)

## Sopiro.

Kristino, pretigu la kofron, mi forvojaĝos.

Jam denove, via sinjorina moŝto? Vi ja nur antaŭ unu semajno revenis.

Tamen! Estas necese por Esperanto. Bonvolu pretigi la kofron!

Kiun kofron vi deziras ĉi tiun fojon, sinjorino?

La plej malgrandan. Mi ĝin havos en la kupeo.

Sed via moŝto, ĝi fariĝos tro peza, vi ĉiam kunprenas tiom da libroj.

Trankviliĝu. Ĉi tiun fojon mi nur kunprenos unu bonan, novan libron, kiu ĵus aperis.

Kaj la vortaroj?

Vortarojn mi ne bezonas, ĉiu bona Esperantisto havas sian vortaron en la kapo.

Efektive sen vortaroj mi forveturis. En la kupeo mi eltiris mian libron kaj komforte sidante mi komencis legi. Kia plezuro! Bona, eleganta stilo, interesa enhavo, nia lingvo ĉiam admirinda! Jen nova, bona esprimo, mi krajone ĝin notas. Kaj jen nova vorto! Sen klarigo, bedaŭrinde, sed el la tutaĵo mi komprenas la sencon. Post kelkaj paĝoj dua notinda vorto, ĉu tiu ĉi vorto

ekzistas aŭ ne? Krajona streketo, mi hejme vidos, ĉu ĝi estas en la vortaro. En la Universala ĝi certe ne estas, eble en la aldono. Jen alia duonkonata vorto! Sed mi jam vidis ĝin en la vortaro de Cart. Ne, mi eraras. Kabe havas la vorton.

Tio nur estis la komenco. Dum mia tuta vojaĝo, leginte ankoraŭ aliajn librojn, mi tre ofte estis en dubo, ĉu diversaj esprimoj troviĝis inter la jam aprobitaj vortoj aŭ ne, ĉu ili estas en mia bela, ampleksa Boirac, en mia ofte uzata Kabe, aŭ en iu ajn alia vortaro. De tago al tago mi pli sopiris je miaj vortaroj, mi preskaŭ malsaniĝis, tio jam estis vera nostalgio!

Mi preskaŭ korpan doloron sentis kaj mi decidis, ke alian fojon mi kunhavos kofron plenan je leksikonoj. Eĉ francan vortaron mi kunprenos. Vera hejmveo kaptis min!

Hejmveo? Ĉu la vorto ekzistas? Ĉu mi ne vidis ĝin ie? Eble ĉe Christaller?

Senprokraste hejmen per rapidvagonaro!

Via sinjorina moŝto jam revenis?

Kristino, la vortaroj al mi mankis!

---

## Interkonsento.

La Esperantistoj estas popolo, kiu konsistas el tri klasoj da homoj, nome: el verkistoj, redaktoroj kaj legantoj.

La verkistoj uzas Esperanton en ĉiuj fakoj, ili elprovas ĝin laŭ multaj direktoj kaj vidpunktoj, ili pruvas kaj certigas ĝian taŭgecon. Kompreneble ili havas la rajton enkonduki necesajn novajn vortojn. En ĉiu okazo, se la nuna vorttrezoro ne sufiĉas, ili povas, kvazaŭ propone, enkonduki novaĵon, aŭ fakesprimon aŭ radikvorton. La fakesprimoj estu kiel eble plej internaciaj, tion la verkisto tre zorgeme pristudadu kaj esploru. Same singardema li estu koncerne la elekton de nova radikvorto, ĉerpita el sia nacia lingvo por plej delikata esperantigado de ia anima ideo.

La legantoj ĝenerale ne ŝatas la novajn vortojn. Ili deziras ĉion kompreni, ili perdas la fidon al siaj vortaroj, ili sin sentas preskaŭ ofenditaj per nekonataj al ili vortoj. Kelkaj el ili serĉas la „neologismon" en ia fremdvortara „leksikono" aŭ en iu ajn nacilingva vortaro. Trovinte

la vorton ili estas tre fieraj pri sia kono, ili uzas kaj aprobas la vorton, ĉar ĝi ja estas presita! Aliaj legantoj ne estas tiel cedemaj, ili minacas, ke ili skribos riproĉan leteron al la redakcio. Tion ili tamen ne faras, aŭ pro ĝentileco aŭ pro malenergio.

En la mezo inter la du partioj sin trovas la redaktoro. Li devas plaĉi al ili ambaŭ, li ne povas kaj volas ofendi la verkistojn, kiuj sendas al li valorajn manuskriptojn, li tial ne povas forstreki ĉiujn novajn vortojn, eĉ se li ne aprobas ilin. Alieflanke li ankaŭ volas plaĉi al la legantoj, al la karaj, ŝatataj abonantoj, de kiuj morto kaj vivo de la gazeto dependas. Kion fari? Kiamaniere agi kiel honesta redaktoro?

Plej bona solvo de la problemo estus efektivigo de

interkonsento

inter la tri partioj.

Pro tio necese estas, unue, ke la redaktoro mem havigu al si ĝustan aŭ pli bone, memstaran opinion pri la enkonduko de novaj vortoj. Due, li devas konigi al la verkistoj sian opinion, la regulon elektitan por sia gazeto. Trie, li ĉiam klarigu per piednotoj aŭ en krampoj la novan vorton. Kvare, li starigu lingvan fakon en ia angulo de la gazeto. en kiu li estas preta, pub-

likigi la opiniojn de la legantoj, al li sendotajn pri novaj vortoj.

Post ne longa tempo bela harmonio inter la tri partioj ekzistos, facile kaj bone per interkonsento la lingvo evolucios.

---

# Taŭra kurado

aŭ

# Bova batalkurado en Barcelono 1909.

Jam survoje en la kupeo ni priparolis la demandon: ĉu vidi la batalkuradon aŭ ne? Preskaŭ ĉiuj Esperantistoj tre energie esprimis sian decidon, ne partopreni en tiu kruela amuzado. „Mi ne volas havi tiun teruran impreson," diris unu el ili. „Mi volas montri mian abomenon per mia forrestado", aldonis la dua kaj la tria diris: „Estus peke, helpi per eĉ unu centimo je tiu ĉi barbara kutimo."

Ĉiuj opiniis, ke la ideala celado de la Esperantismo tute malpermesas la viziton de la batalkuradoj. La plejmultaj el ili efektive ne iris. Sed kelkaj el ia motivo tamen riskis la viziton. Mi apartenis al ili. Jen mia motivo: mi estas avino, miaj nepoj neniam pardonus, se mi ne rakontus pri la fama, al ili interesega afero.

Sabaton vespere mi estis alveninta, jam dimanĉon posttagmeze mi sidis en la areno. Kiaj kontrastoj dum tiu ĉi dimanĉo! Je la deka

katolika diservo kun emocia prediko de abato Richardson, je la dekunua solena akcepto de D-ro Zamenhof, tiam diservo en la angla preĝejo kun kortuŝa prediko de Reverend Rust kaj nun la batalkurado!

Jen mi sidis en efektiva areno. Nun mi ne estis en antikva ruino, kiel iafoje, vizitinte Veronon. Tiam mi kun miro rigardis dezertan lokon, kiun nur la fantazio plenigis je videmaj alestintoj en iamega tempo, nun mi min trovis en la mezo de vivantaj, samtempaj homoj!

La afero jam komenciĝis, mi do ne vidis la majestan eniron de la pompa sekvantaro, la solenan malfermon de la ceremonio per la prezidanto. Mi devas konfesi, ke la kvar ĉevaloj, kiujn mi vidis, ne faris tre luksan impreson, ili estis malgrasaj, negraciaj bestoj, iliaj movoj estis timemaj kaj nedecidaj. La mallongigitaj vostoj montris, ke ili estis maljunaj militĉevaloj. La rajdantoj estis fantazie vestitaj, kavalire aŭ harlekene; sur la mizeraj ĉevaloj, la lancon antaŭen streĉitan, ili ĉiuj similis al Don Kiĥoto de la Manĉo. En la mezo de la areno staris la virbovo, fiere nomata taŭro. Ĉin ĉirkaŭsaltas lerte la mantelistoj, silkevestitaj junuloj. Ĉiu el ili svingas ruĝan mantelon aŭ tukon antaŭ la okuloj de la bovo, singarde ili etendas la tukon per streĉita brako ne antaŭ, sed flanke de siaj

korpoj. La virbovo kolere alkuras, ĉar ĝi kredas la tukon danĝera malamiko, per la akraj kornoj ĝi nur trafas molan ŝtofon, rapide forŝiritan. Preskaŭ neniam la bovo rimarkas aŭ trafas la manteliston, ĝi ne komprenas, ke la homo estas la malamiko. La afero ŝajnis al mi tiel luda kaj sendanĝera, ke mi demandis mian hispanan amikon, kiu afable kondukis min: „Ĉu la taŭro estas dresita?" „Ho ne, „li respondis, „ĝi vidas la unuan fojon toreadorojn." „Ĉu ĝi jam ricevis pikon, „mi demandis, „ĝi havas ian ruĝaĵon sur la kolo." „Tio estas la signo de la bieno", s-ro S.rediris, „kie oni edukis kaj paŝtis tiun ĉi belegan beston." Antaŭ miaj animaj okuloj aperis vastaj verdaj paŝtejoj kun granda, bela brutaro . . . . . . . . „Kio fariĝos kun la taŭro poste, post la mortigo?" mi rapide demandis. „Morgaŭ ĝi estas manĝota kun apetito," gaje respondis la amiko. „Tio do nur estas ludo? La homoj ludas kun la taŭro, kiel la kato ludas kun la muso?" Kiel fulmo traflugas mian cerbon la imago de ĉasfesto kaj kurĉaso, sed mi ne havis tempon por pensi al ludoj, ĉar io terura okazis. Dum la ludo de la mantelistoj, kavaliro estis alrajdanta la bovon, li ĝin piketis aŭ minacis per lanco! La bovo ĉi tiun fojon denove eraris pri la malamiko: ĝi dronigis la kornojn en la ventron de la senkulpa ĉevalo. La terurigita

besto vertikale stariĝas, renversiĝas, falas sur la rajdiston. Unu amaso da korpoj: bovo, ĉevalo, homo! Mia koro ĉesis bati! Sed nenio okazis, la taŭro deturnis sin, ĝi forkuris, aŭ forlogita de mantelisto, aŭ ĉar ĝi ne estas karnomanĝulo. La toreadoro ne estis mortpremita, alkuris toreadoroj helpantaj. Sed la ĉevalo estis morte vundita, malfeliĉa besto! Ĝian tutan vivon ĝi servis fidele la homojn, nun ili preparas al ĝi neatenditan teruran morton. Mi nur nun rimarkis, ke la okuloj de la ĉevaloj estis kovritaj, grandaj ledaĵoj dense kovris la tutan vizaĝon, blindigitaj oni kondukas ilin kontraŭ la furioza monstro! Kvar fojojn mi vidis la saman teruraĵon, kvar ĉevalkadavroj fine kuŝis ĉe la rando de la areno. La homoj kriis, aplaŭdis, vokis kaj bruadis, el la buŝoj de la bestoj mi ne aŭdis eĉ unu tonon. Eble mi aŭdigis ian malaprobban vorton, ĉar mia hispana amiko diris: „La fremduloj ofte tro severe nin riproĉas pro la kurbataloj. Ili ne estas pravaj. Nia nacio bezonas ĉi tiun emocion. Aliaj nacioj havas ian alian. La popolo amas siajn ludojn pasie. La infanoj ludas kurbatalon. La bienposedantoj zorge kulturas brutarojn por eduki virbovojn. Multaj personoj gajnas sian vivtenadon per tio." Mi silentis. Komencis nun la kruela pikado de la taŭro per pikiloj, bele kaj gaje ornamitaj de rubandoj. Baldaŭ kvar

aŭ kvin longaj pikiloj pendis ĉe la kolo de la taŭro, sango elfluis el la vundoj. Subite mi aŭdis la vorton: „Gracia por la taŭro“ (aŭ ian similan) kaj mi vidis matadorojn*) kun longa spado ĉe la bovo. Unu el ili ĝin trafas en la kolon, sen unu laŭto la forta besto falas teren, mortefrapita. Sed kial nun tia bruo? Tio ne ŝajnas esti aplaŭdo: oni fajfas, krias, insultas! Kio okazis? Mia amiko klarigas al mi la aferon. La popolo opinias, ke la prezidanto tro frue donis la signon por la mortigo. Ili insultas kaj riproĉegas lin, ili nomas lin azeno, montras al li minace malnovajn botojn k. t. p.

Nun la unua „ludo“ finiĝis. Envenis jungaĵo de kvar ĉevaloj, viroj alligis la kornojn de la bovo al la rimenaĵo, la ĉevaloj galope fortiris la senvivan korpon tra la sablejo de la areno. Malagrabla aspekto! La kadavrojn de la ĉevaloj viroj forportis sur portiloj, oni purigis kaj rastis la lokon, ĉar nova batalkurado komenciĝis. Nova bovo, kvar ĉevaloj . . . post duono da horo kvin kadavroj! Ĉiam nova ripetado de la kruela ludo, kvar bovoj, deksesĉevaloj dum unu bela, dimanĉa posttagmezo. Ĉiam la sama ripetado, baldaŭ enua por la fremdulo, ĉiam interesa kaj nova por la hispano, kiu detale konas ĉiujn

*) Toreadoro, kiu havas la rajton mortigi virbovon dum kurludo.

variantojn de la historia amuzaĵo. Du kuradojn mi vidis, tiam mi foriris. Ĉu mi bedaŭras, ke mi vidis la prezentadon? Certe ne, mi nun pli bone ol sen tiu ĉi vizito povas juĝi, mi povas ankoraŭ multe pli energie paroli aŭ skribi kontraŭ la malbona, malinda kutimo.

Mia afabla amiko ankoraŭ multajn demandojn respondis. Mi aŭdis, ke dum somero en ĉiu sufiĉe granda urbo ĉiudimanĉe okazas bova batalkurado. Kiam en la semajno estas religia festotago, ankaŭ en tiu tago kurado estas aranĝita. Mi demandis: „Kiu aranĝas ilin, ĉu la urbo aŭ la ŝtato?“ „Nek unu, nek alia,“ s-ro S. respondis, „ĝi estas privata entrepreno. La konstruaĵo ekzistas, iu ĝin aĉetas. Li dungas la artistojn, kiuj ludas sian ludon dum kelkaj semajnoj aŭ monatoj. Tiam ili estas dungitaj de alia posedanto de areno, ili migras de urbo al urbo, ili montras sian lertecon, gajnas multe da mono kaj amuzas la popolon.“

Mi meditis: Tio daŭros ĝis aliaj ludoj pli multe allogos la homojn, eble biciklado aŭ aerveturado. Ankaŭ la kuradoj mem estas aliformeblaj, jam nun ŝanĝo komenciĝis. Iam oni ankaŭ havis hundojn en la areno, ili malaperis. La ĉevaloj eble ankaŭ baldaŭ malaperos. La homoj ne plu ŝatos vidi la mizerajn bestojn. En kelkaj urboj oni enŝovis elegantajn kvadrilojn en la

prezentadon. En aliaj oni ne mortigas la bovoviron, oni nur montras la lertan ludon de la mantelistoj. En kelkaj urboj la nobeluloj ne plu vizitas la sangan batalkuradon. Ekzistas eĉ unuiĝoj kontraŭ la mezepoka kutimo. Ĉiu homo helpu iel malaperigi ĝin laŭ sia povo. Ankaŭ tiuj ĉi linioj celu al la forigo de la malbona plezuro de bonkora, brava popolo. Ĝi meritas pli belajn, pli homindajn festojn!

Kion do diris miaj nepoj, aŭdinte la rakonton pri la bova batalkurado? Komence la okuloj brilis, kun ĝojo kaj intereso ili aŭskultis. Mi rakontis iom singarde sed tute laŭvere, mi priskribis la belajn kolorojn de la vestoj, la lertecon de la toreadoroj, la amuzan ludon de la mantelistoj, miaj malgrandaj aŭdintoj ĝojis kaj admiris. Sed kiam ili aŭdis pri la morto de la ĉevaloj, kompato malheligis la okulojn, silente ili ankaŭ aŭdis la finon de la bovo. Tio ne ŝajnis heroa batalo, la junaj koroj sentis la malindecon de la afero. Fariĝu viroj, miaj knaboj, kaj elpensu ian bonan, belan por la homoj, viaj fratoj!

---

## La parolanta kanario.

Dum la lasta jarfoiro ruza viro skribis sur sian budon:

„La parolanta kanario.“ Multaj personoj eniris kaj ĉiuj revenis ridante. Al demandoj ili respondis: „Certe, certe, ĝi parolas, eniru nur.“

La viro atendis ĝis dek personoj troviĝis en la budo.

Tiam li fortiris tukon de la kaĝo kaj demandis la birdon:

„Ĉu vi volas cigaron aŭ pipon?“

„Pip“, respondis la birdo.

„La akuzativon ĝi ne ankoraŭ lernis,“ klarigis la viro.

## La nova monumento.

Ĉu vi jam aŭdis pri la nova Wagnermonumento en F.? Ĝi havas tre rimarkindan econ.

Kian econ do?

La fama komponisto staras sur bela piedestalo, en sia mano li havas partituron, muzikan kajeron. Kaj nun imagu nur: aŭdante la sonoradon de la dekdua li turnas folion, kaj vidante aŭtomobilon, li ekpiedbatas la piedestalon!

Mirinde! Ĉu estas vere?

Jes, certe, kiel mi diras: aŭdante la sonoradon de la dekdua li turnas folion, kaj vidante aŭtomobilon li ekpiedbatas la piedestalon.

## La helpantino.

En malgranda franca urbo fraŭlino Mueller donis esperantan instruadon. La junaj lernantinoj estis tre fervoraj, nur la elparoladon de la laŭto „aŭ“ ili ne povis lerni.

Fraŭlino Mueller estis Svisanino, ŝi ne komprenis, ke la belaj francaj buŝoj ne povis elparoli la aŭon.

Post ĉiu instruada horo la lernantinoj diris: „Adio, frolino, ĝis morgo!“

Unu fojon, posttagmeze, fraŭlino Mueller sidis en sia apogseĝo, trinkante kafon kun lakto. Alvenis ŝia bela blanka kato, frotetis sian kapon je ŝia genuo kaj per laŭta miaŭo petegis lakton.

„Bone“, pensis fraŭlino Mueller, „vi nin helpos.“

La alian tagon, fraŭlino Mueller, dum la instruado, allogis la katon per lakto. „Miaŭ,“ petegis la kateto.

„Mio, mio, mio,“ la junulinoj ridante ripetadis. Iliaj francaj oreletoj aŭdis: mio, kaj ne miaŭ!

## Ĉu lingvo internacia estas bezona?

En Ĥinujo vojaĝadis Eŭropano. Foje, kiam li mendis tagmanĝon en ĥina restoracio, la gastiganto metis sur tablon tre malgrandan rostaĵon.

La sinjoro, kiu ne sciis la ĥinan lingvon iom suspekteme demandis:

„Miaŭ"?

La gastiganto nee balancis la kapon, dirante trankvilige:

„Vaŭ vaŭ!"

# La verda stelo.

Marie Hankel.

Clemens Braun.









Eldonejo: Deutsche Esperanto Buchhandlung, Leipzig.
D.E.B.4

De ĉi tiu ĥoro ekzistas aparta eldono: Partituro Sm. —.20, ĉiu voĉparto Sm. —.05.

# Enhavo.

## Unua Parto.

### Poezio.

Paĝo

Moto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
La verda stelo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 7
Post la unua kongreso . . . . . . . . . . . 8
Esperantujo . . . . . . . . . . . . . . . . . 9
En sonĝo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 10
Nia lingvo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 11
Nia Esperanto vivas . . . . . . . . . . . . . 12
Prologo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 13
Matenfruo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 14
La bukloj de Simson . . . . . . . . . . . . 14
La simbolo de l'amo . . . . . . . . . . . . . 15
En doloro . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16
Konstruestro Zamenhof . . . . . . . . . . . 16
La busto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 17
Ĝuego . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 18
Vana espero . . . . . . . . . . . . . . . . . 19
Al Sully-Prudhomme, adiaŭ el Germanujo . . . 20
La sonĝo de l'tero . . . . . . . . . . . . . 21
Adiaŭa vorto de la reĝino . . . . . . . . . . 21
Mia hejmo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 23
Sankta nokto . . . . . . . . . . . . . . . . 24
Patrino kun infano . . . . . . . . . . . . . 25
Sankta Kristofero . . . . . . . . . . . . . . 26

# Dua Parto.

## Prozo.


Pago

Ĉu la homo amas la naturon? . . . . . . . . . 33
La batalo pro la vivo . . . . . . . . . . . . 37
La vizito de la Ge-Sezonoj . . . . . . . . . 40
La Bono . . . . . . . . . . . . . . . . . . 43
La Belo . . . . . . . . . . . . . . . . . . 43
La Vero . . . . . . . . . . . . . . . . . . 43
Nokto, la amikino de la homoj . . . . . . . . 44
Ĉielaj imagoj . . . . . . . . . . . . . . . 45
Internacieco . . . . . . . . . . . . . . . . 47
La grafo Zeppelin . . . . . . . . . . . . . . 50
Letero al la regnanoj . . . . . . . . . . . . 54
D-ro Esperanto . . . . . . . . . . . . . . . 57
Meditoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 60
La deka muzo . . . . . . . . . . . . . . . . 62
Fabelo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 64
Kial ni ne devas ŝanĝi Esperanton . . . . . . 66
Nia lingvo . . . . . . . . . . . . . . . . . 69
Sopiro . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 72
Interkonsento . . . . . . . . . . . . . . . . 74
Taŭra kurado aŭ Bova batalkurado en Barcelona 1909 . . . . . . . . . . . . . . . . . . 77
La parolanta kanario . . . . . . . . . . . . 84
La nova monumento . . . . . . . . . . . . . . 85
La helpantino . . . . . . . . . . . . . . . . 86
Ĉu lingvo internacia estas bezona? . . . . . . 87
Muzika aldono: La verda stelo de S-ro Clemens Braun . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 88




KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego
Nr ..................
FILIA Nr 14
w Białymstoku

Buchdruckerei Hermann Schneider,
Leipzig, Gutenbergstraße 2. 11392

# Efikplenaj Propagandiloj

## Inkosorbilo „Esperanto“ sen sorba papero

kun verdaj steloj, terglobo kaj surskribo „Esperanto“.

**Sm. 0.65, 10 ekz. Sm. 5,50, neafrankite.**

Tiu ĉi bela kaj praktika novaĵo, sen sorba papero, kun speciala daŭre inkon sorbema maso, ŝparigas tempon kaj monon per sia ĉiumomenta uzebleco kaj daŭremeco.

**Treege taŭga donaco.**

## Internacia-Propaganda-Koresp.-Poŝtkarto.

Seslingva kun plej nova bildo de D-ro Zamenhof.

Po 10 ekz. Sm. 0.15, po 50 ekz. Sm. 0.55,
po 100 ekz. Sm. 0.90, po 1000 ekz. Sm. 5.20 afrankite.

Gesamideanoj, uzu por viaj korespondadoj sole ĉi tiun Esperanto-Poŝtkarton.

## SIGELMARKOJ

reliefe stampitaj

**Bonega propagandilo**

Surhavas la terglobon kaj verdan stelon.

La teksto estas nur en Esperanto.

Po 50 ekz. Sm. 0.25, po 100 ekz. Sm. 0.35, po 1000 ekz. Sm. 2.65 ĉien afrankite.

**Deutsche Esperanto-Buchhandlung, Leipzig**

# Insignoj Esperantistaj

**Belega, verda stelo, vere arĝenta.**

**Ĉie prefere portataj.**

Du grandecoj:
10 mm (n-ro 1), 15 mm (n-roj 2—5).

La insignoj n-roj 2—5 havas
la surskribon „Esperanto".

Nro 1-a malgranda kravatpinglo:
po unu Sm. 0.20; po 10 Sm. 1.75

Nro 2-a belega kravat-aŭ vestpinglo:
po unu Sm. 0.30; po 10 Sm. 2.50

Nro 3-a la sama, broĉforma:
po unu Sm. 0.30; po 10 Sm. 2.50

Nro 4-a la sama por butontruo:
po unu Sm. 0.30; po 10 Sm. 2.50

Nro 5-a la sama kiel manumbutonoj kun ĉenetoj:
po paro Sm. 0.75; po 10 paroj Sm. 6.25

**Ĉiuj insignoj surhavas la arĝentstampon.**

Deuts[illegible] Leipzig



Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-F14-0002621